Di sana, saya mengunjungi keluarga dan teman serta beberapa tempat pariwisata. Tentu saja saya mengunjungi dan berdoa di depan makam almarhum papa saya. Saya memutuskan untuk mengunjungi beberapa lokasi pariwisata untuk mengisi waktu liburan saya. Secara pribadi, saya lebih memilih tempat-tempat wisata alam karena saya bisa merasakan karya agung Tuhan dan bisa bertemu dengan para pengunjung baru. Tempat-tempat tersebut bernama Pantai Oetune, Pantai Kolbano dan air terjun Oehala. Tempat tersebut memanjakan saya dengan pemandangan yang sempurna sehingga saya sungkan untuk meninggalkan mereka.

Pertama, Pantai Oetune yang berlokasi di Bena, Amnuban Barat. Pantai ini menakutkan saya dengan pasir pantai yang halus, sangat bersih dan memiliki garis pantai yang panjang. Para pelancong yang pernah mengunjungi pantai tersebut, mengatakan bahwa pantai ini sama seperti pantai Kuta di Bali. Untuk menjangkau pantai tersebut yang memiliki jarak kira – kira 150 kilometer dari Kupang, anda harus melewati jembatan Noelmina dan langsung berbelok ke kanan atau dari kota saya, Soe kira – kira satu jam dan langsung belok kiri dan tidak perlu melewati jembatan Noelmina. Sekarang jalannya sudah bagus jadi anda tidak perlu khawatir.

Kedua, pantai Kolbano, karena berada di lokasi yang sama, anda hanya perlu melanjutkan perjalanan anda saja kira – kira 50 menit dari pantai Oetune. Perbedaannya, Pantai Kolbano terisi dengan batu berwarna – warni. Sepanjang garis pantai Kolbano, batu berwarna bisa ditemukan dalam berbagai warna dalam berbagai bentuk dan ukuran. Ada yang berwarna merah, kuning, hijau, hitam, putih, bahkan ada tiga warna dalam satu batu seperti merah, hitam dan krem, keren bukan?





Tria, mia lasta vizito estas al Oehala natura akvofalo. Ĝi estas en Soe, mia hejmurbo. Se vi volas viziti mian urbon, ĝi estas ĉirkaŭ 2 horojn for de Kupang. Ĝi estas natura akvofalo kiu konsistas el sep nivelojn de naturaj ŝtonoj. La akvo estas tre peza. Kiam vi trempas viajn piedojn senti vin tre freŝa, eble vi ankaŭ povas trempi tie ĉar vi sentos malsaman senton tra tiu akvo. Kelkaj homoj diras ke tio estas natura masaĝo se vi havas probleman sanon. Mi sugestas, ke se vi volas fari fotojn, la bona momento estas vespere ĉirkaŭ 16 h 00, do vi povas eviti la sunon kaj vi povas havi bonan bildon, kiel vi esperis. Estu nia komuna intenco ke Soe estas konata kiel malvarma urbo, do vi devas alporti jakon kaj la malvarma sezono daŭras de Februaro ĝis Junio kaj krome ĝi estas konata pro ĝia frukto nomata Lemun Cina (keprok frukto) kaj la gusto estas tre dolĉa kaj freŝa.



Poste mi reiris el mia hejmurbo, Kupang, mi ankaŭ vojaĝis al kelkaj lokoj en Java insulo. Unua, respondas mian scivolan pri la plej alta statuo en la mondo, ĉirkaŭ 42 metrojn alta, Virgulino Maria. Mi iris tien per motorciklo al Ambarawa, Centra Javo. Ĝi estas la religia loko por katolikoj kiuj faras pilgrimon. La statuo estas fabela kaj bela. Due pro tio, ke Ambarawa kaj Semarang estas je la sama provinco, mi vizitis ankaŭ tradician bazaron, Johar, tiu loko ofertas malmultekostajn aĵojn kaj la Lawang Sewu konstruaĵon. Bedaŭrinde estis nokto, do mi ne povas eniri la konstruaĵon.



Mi daŭrigis mian vojaĝon al Muzeo de De Javaseche Bank en Orienta Javo. Tiu loko estas muzeo kiu iam estis uzita kiel banko. Tie, mi vidis la malnovajn bildojn pri la banko, malnovajn monojn kaj aliajn malnovajn ilojn kiuj estis uzataj en tiu tempo. Mia lasta vojaĝo finiĝis en Jogjakarto. En Jogjakarto, mi vizitis Muzeon de Merapi en Ketep kaj Muzeon de Merapi en Kaliurang regiono. Ni povas gajni informojn pri Merapi monto kaj la bildoj tie eksplikis al ni kiam Merapi erupciis kaj la lastan fojon, kiam Merapi erupciis. Mi ĝuis mian viziton al kelkaj plaĝoj en Jogjakarta kiel Goa Cemara, Glagah, Depok, Parangtritis kaj Baru. Vere, tio estas mia speciala vojaĝo.. Se vi volas viziti mian hejmurbon, mi plezure helpos vin. Saluton! :-)



Ketiga, kunjungan terakhiro sja berkaĥir di air terĥun alami Oehala. Termpat ini berada di kota sja Soe, sekita 2 ĥam dari Kupang. Air terĥun ini terdiri dari 7 tingkat batu alami. Airnya sangat deras. Ketika anda merendam kaki anda, terasa sangat segar, mungkin anda bisa berendam disana juga karena anda bisa merasakan sensasi berbeda dari air tersebut. Beberapa orang mengatakan bahwa air tersebut bisa menjadi pijat alami dan sangat bagus apabila anda memiliki masalah kesehatan. Sja sarankan, seandainya anda ingin mengabadikan foto – foto disana, tepat pada pukul 16 ; 00 atau pukul 4 sore, sehingga anda bisa terhalang dari sinar matahari dan mendapatkan gambar yang bagus seperti yang anda harapkan. Menjadi perhatian kita bersama, Soe dikenal sebagai kota dingin jadi anda harus menyediakan jaket dan musim dingin mulai dari bulan Februari sampai Juni. Kota ini terkenal juga dengan buahnya yang bernama Lemun Cina atau buah keprok dan rasanya sangat segar dan manis

Sekembalinya sja dari Kupang, sja juga mengunjungi beberapa tempat di Pulau Jawa. Pertama, untuk menjawab rasa penasaran sja tentang patung tertinggi di dunia, kira – kira 42 meter, Santa Perawan Maria, sja pergi kesana dengan mengendarai motor ke Ambarawa, Jawa Tengah. Ini adalah tempat religi bagi umat katolik yang melakukan kegiatan ziarah. Patung ini sangat menakjubkan dan cantik. Karena Ambarawa & Semarang berada di provinsi yang sama, sja mengunjungi pasar tradisional Johar yang menawarkan banyak barang murah dan bangunan Lawang Sewu, sayangnya sja tidak bisa masuk kedalam karena hari sudah malam.

Sja melanjutkan perjalanan sja ke De Javasche Bank di Jawa Timur, adalah sebuah museum yang pernah digunakan sebagai bank pada zaman tersebut. Disana sja melihat foto – foto kuno tentang bank tersebut, uang – uang kuno dan barang – barang kuno lainnya yang pernah digunakan pada masanya. Perjalanan terakhiro sja berakĥir di Jogjakarta. Di Jogjakarta, sja mengunjungi Museum Merapi yang barada di Ketep dan di daerah Kaliurang. Kita bisa memperoleh informasi tentang gunung Merapi dan gambar – gambar di sana menerangkan kepada kita kapan gunung Merapi meletus dan terkahir kali meletus. Sja pun sangat menikmati kunjungan sja ke beberapa pantai di Jogjakarta seperti Goa Cemara, Baru, Glagah, Depok dan Parangtritis. Perjalanan yang sangat luar biasa! Jika kamu ingin mengunjungi kota sja, dengan senang hati, sja membantu Anda. Salam :-)

Memorinda Renkontiĝo kun S-ro Lee Jung Kee

✉ pande_takumar@hotmail.com

Pande Sri S. @ Bali


Ln la 11-a septembro, 2015, mi ricevis fejsbukmesaĝon de la prezidantino de Indonezia-Esperanto Asocio (IEA), s-ino Ilia Sumilfia Dewi. Ŝi sciigis min ke esperantisto el Koreio kies nomo estas s-ro Lee Jung Kee vizitos Balion en la fina parto de septembro. Nelonge poste, s-ro Lee Jung Kee kaj mi amikiĝis en Fejsbuko. Ni babilis kun unu la alia, pri niaj aĝoj kaj profesioj. S-ro Lee estos unu el la gastparolantoj en la Trilanda Kongreso de Esperanto (Aŭstralio, Novzelando kaj Indonezio), kiu okazos en la urbo Bandung, Indonezio en la sekvontjara marto (de la 23-a ĝis la 28-a marto 2016). S-ro Lee ankaŭ diris al mi kie li kaj liaj familianoj tranoktos en Balio.

Mi informas miajn geamikojn (Icha, Dina, Laksmi, Nyoman, Kadek, ktp.), kiuj ankaŭ lernas Esperanton kun mi, pri la bona novaĵo (la vizito). Certe, ili ĝojis kaj volis renkonti S-ron Lee ankaŭ. Estas ĝuste, korekta ke renkonti eksterlandajn esperantistojn povas doni grandan motivon al komencantoj. Antaŭ s-ro Lee, vizitis ankaŭ la insulon Balio s-ino Heidi Goes el Belgio por enkonduki Esperanton kaj dividi siajn spertojn. Tamen ĉi-foje domaĝe, por miaj geamikoj ne estis oportune por ili renkonti s-ro Lee pro siaj propraj aferoj. Ĉar la hotelo estas malproksima de kie mi loĝas, mi petas informon pri kiel atingi la hotelon de mia amikino kiu laboras en tiu hotelo.

La 26-an de septembro posttagmeze, neakompanita, mi veturis per motorciklo laŭ la aŭtovojo Bali Mandara al Nusa Dua. Danke al ŝi (mia amikino nome Denny), laŭ ŝia indiko, mi facile povis trovi la hotelon, kiu sidas ne malproksime de la aŭtovojo. Ĉirkaŭ je la 5-a horo posttagmeze, mi unuafoje povis alvizaĝi s-ron Lee. Mi ankaŭ konatiĝis kun liaj familianoj kaj salutis al ili en Esperanto. Manĝinte, en la kafejo de la hotelo, ni parolis en Esperanto. Aliaj gegastigantoj rigardis nin eble pro tio, ke la lingvo ni uzis estis tre fremda al iliaj oreloj. Mi mem sentas min feliĉa ke mi konas kaj scias Esperanton kaj

eblas renkonti samideanojn per Esperanto. Mi esperis ke iuj aliaj Balianoj povis alveni tien, aŭskultinta nin parolinta en Esperanto. Pri multaj da aferoj ni parolis, tiuspeca pri mia renkontiĝo kun Esperanto, la movado en Balio ĝis nun kaj pri la universitata Esperanto-edukado en Koreio.

Post sunsubiro, ni kaptis fotojn antaŭ la hotelĉambro de s-ro Lee. Li ankaŭ donacis Esperanto-legaĵojn ('Leteroj el Koreio' de s-ro Lee, 'Afrikaj Proverboj' de Adjevi Adje kaj informiloj de Seula UK en 2017). Mi havas amuzan tempon leganta la librojn kiujn s-ro Lee donis por vigligi la movadon en Balio. Mi esperas ke aperigos pli da esperantistoj en la bela insulo Balio. Koran dankon al s-ro Lee kaj s-ino Ilia por la memorinda renkontiĝo kaj ĝis revido.



Havu Esperantajn Akcesoraĵojn

Konu Esperanton, nian amatan internacian lingvon, por via urbo, via lernejo oŭ universitato. Ĵazu vian Esperanton klubon per multaj, bonaj, malmultkostaj Esperantaj akcesoraĵoj. Ni havas membro-pinglojn, grandajn flagojn, k.t.p. Ni aldonos multajn akcesoraĵojn poste.

Milikilah Aksesoris Esperanto

Perkenalkanlah bahasa Esperanto, bahasa Internasional tercinta kita, ke kota-kota sekitarmu, sekolah atau universitas di sekitarmu. Semarakkan klub Esperantomu dengan berbagai aksesoris Esperanto yang bagus dan ekonomis . Kami memiliki pin anggota, bendera besar dan beberapa barang lain yang akan kami tambah di masa mendatang.



<http://www.tokopedia.com/esperanto>

Raporteto Pri Diversaj Esperantaj Agadoj

✉ ilia.dewi@gmail.com

Ilia Sumilfia Dewi @ Bekasi

Je la 13a de Septembro, mi havis ŝancon por enkonduki Esperanton ĉe iu lingva komunumo kiu nomiĝas **Fakta Bahasa** en mia urbo, Bekasi. Ĉirkaŭ 35 gejunuloj kunvenis tiun tagmezon post havi lecionon kun **Eko Nur Syah** kiu gvidis la klason. Plejparte ili estas novuloj kiuj neniam scias pri Esperanto antaŭe tamen interesiĝas lerni la lingvon pro ĝia unika gramatiko kaj la historio. Dum 1 horoj mi prezentis aferojn rilate al la movado de Esperanto en Indonezio, la evento de **Trilanda Kongreso** en 2016 kaj pri **Indonezia Esperanto-Asocio** (IEA). Poste la klasanoj kuraĝe demandis min kaj respondis miajn demandojn kaj tiel mi disdonis butonojn de Esperanto kiel memoraĵojn. Laste mi denove instigis ilin por partopreni la kongreson en Bandung kiu povos esti bona ŝanco por sperti kiamaniere Esperanto funkcias kaj konatiĝi kun aliaj esperantistoj. **Eko Nur Syah** kiu ankaŭ respondencas kiel prezidanto de Ĝakarta E-klubo prizorgas la Esperantan klason de tiu Fakta Bahasa kaj regule kunvenas du fojojn monate.

Je la 20a mi ĉeestis ĉe regula kunveno de Ĝakarta E-klubo kun 5 aliaj. Ni ekkomencis la lernadon kun baza leciono ĉar tri novuloj venis por la unuan fojon, kaj unu el ili estas okjara knabo. Li estas filo de nia amiko kiu lerte sekvas la lecionon de Esperanto post iom da enkonduko de la pacjo. Mi konsilis al li plu lerni de libro la titolo "**Mil Unuaj Vortoj en Esperanto**" ĉar tiu libro taŭgas por infano kaj li ŝatas ĝin. Sekve ni daŭrigis la lecionon pri simplaj esprimoj en Esperanto kaj la kursanoj praktikis la frazojn. Antaŭ la fino de kurso, la kursanoj faris kvin simplajn frazojn Esperante kaj ni kune korektis ilin; bonege ke nur troviĝis iom da eraroj post tri kaj duono horoj de lernado.

Je la 4an de Oktobro, la klubanoj de Ĝakarta klubo denove kunvenis sed ĉifoje estis speciala tago pro la 5a datreveno de klubo kiu fondiĝis en la 3a de Oktobro 2010. Por festi la tagon ni faris Esperantan kampanjon dum la senveturila tago en la

centro de Ĝakarta, Bundera Hotel Indonesia. Tiam la homoj venis de diversaj partoj de la urbo por bicikli, kuri, promeni kaj ankaŭ aliaj agadoj. Tial ni utiligis la okazon por propagandi Esperanton kaj disdonis faldfoliojn al la publiko.

Matene ni interkonsentis renkontiĝi ĉe iu videbla angulo kaj preparis nin per pretaj propagandiloj. Ĉifoje partoprenis 13 klubanoj kaj kelkaj nur unufoje faris la kampanjon, tial ili iom hezitis proksimiĝi al la homoj. Sed poste ili pli kuraĝe disdonis la informon kaj respondis demandojn. La kampanjon ni faris dum 2 horoj ĝis la 10a matene. Tiam la publiko malmultiĝis kaj la tempo de senveturila tago proksimiĝis al la fino. Poste ni uzis la tempon por fari simplan filmeton pri nia klubo surstrate kaj alian filmeton por lanĉi novan retejon de Indonezia Esperanto-Asocio (IEA) ĉe www.esperanto.or.id kiam samtempe ni havis tagmanĝon en iu restoracio. La filmetojn ni poste publikigos ĉe **YouTube**.

Je la 16a mi forveturis fruamatemne al Bandung por plenumi la inviton de **Pasundan Universitato** kiu lanĉos programon de lingva lernado kaj ĉifoje ili denove volas ke ankaŭ Esperanto estu instruata. Pro tiu mi estis invitita por enkonduki la lingvon al studentoj kies fakoj estas internaciaj rilatoj. Por certigi mian ĝustatempan alvenon, mi veturis per la plej frua buso je la 5a horo matene kaj tiam mi atingis la urbon je la 8a horo. Feliĉe ke mi ankoraŭ havis pli ol unu kaj duonan horon kaj tial unue mi renkontis **Qonita**-n kiu respondencas pri E-klubo en Bandung kaj pretas gastigi min dum la vizito.

Je la 9.30horo ni kune iris al la universitato kaj bonveniĝis de junaj organizantoj. Mi vidis, ke kelkaj homoj jam alvenis kaj tiam mi ekkomencis disdoni flugfoliojn por ke ili havu iom da informo pri Esperanto kaj ĝia movado en Indonezio. Ĉeestis ĉirkaŭ 35 gestudentoj kaj unu docento kiu oficiale malfermis la programon de lingva lernado. Mi havis okazon por enkonduki Esperanton kun 2 aktivuloj kies nomoj estas **Syaŭqi Ahmad** kaj **Iyan** post unue estis enkonduko de Franca lingvo. La bazan gramatikon kaj ĝeneralan informon pri Esperanto-movado mi gvidis kaj aliaj amikoj parolis pri siaj spertoj de diversaj E-aranĝoj. Antaŭ la fino, la studentoj havis ŝancon por demandi al la prelegantoj kaj tiel mi havis la bonajn reagojn de ili. Espereble kelkaj decidis aliĝi al la klaso de Esperanto.

Tagmeze mi daŭrigis la agadon por 4a kunsido de **Trilanda Kongreso**, 2016 en Bandung. Tiam kunvenis 12 LKK-anoj kaj diskutis la progreson de preparadoj pri antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj, aliĝilo kaj programeroj.

Je la 17a dimanĉmatene mi kaj 5 klubanoj de Bandung-klubo faris la 3an Esperantan kampanjon

Anoceto



Indonezia Esperanto-Asocio (IEA) ĝoje proponas **Qonita Qurrota'ayun** por kandidatiĝi la subvencion de **34-a Komuna Seminario en Busano, Koreio**.

Espereble ŝi sukcesos!





ĉe Dago kiam la senveturila tago okazis. Sufiĉe multe da homoj utiligis tiun bonan ŝancon por promeni, kuri, bicikli, kunekzerci kaj tiel plu. Dum du kaj duona horoj, ni disdonis la flugfolion kaj respondis la demandojn de scivolemajn homoj kiuj nur unuafoje aŭdas pri Esperanto. Nia ĉeesto ankaŭ kaptis la atenton de iu radio kiu intervjuis nin mallonge pri la celo de kampanjo kaj Esperanta movado en Bandung. Je la 10.30 horo la kampanjo finiĝas tiel mi ĝoje pasigis mian tutan semajfinon kun junaj aktivuloj de Bandung kaj posttagmeze mi forveturis hejmen.

Je la 31a matene mi faris Esperantan enkondukon ĉe komunumo de Akademi Berbagi en mia urbo, Bekasi. Tiu unika komunumo ebligas la membrojn lerni diversajn aferojn senpage ekzemple pri verkado, reta merkato, fari filmeton kaj tiel plu. Mi fakte iam spertis enkonduki Esperanton ĉe tia komunumo en aliaj urboj; Salatiga kaj Jogjakarta.

Mi alvenis ĉe kunvenejo kiu apartenas al ĉiovendejo de 'Alfamart' kaj disponigas la lokon senpage al la komunumo. Bedaŭrinde ke ĝustatempe mi venis kaj nenion mi vidis eĉ la vendeja gardistino nenion scias pri la evento. Mi poste iom

konfuziĝis kaj telefonis la organizantinon. Bonŝance ke post kelkaj minutoj ŝi aperis kaj klarigis la miskomprenon kun la posedanto de kunvenejo tial ŝi ege pardonpetis al mi. Tiel ŝi devis surloke aranĝi la aferon kaj atendante la preparadon mi ekbabilis kun la organizantino kies nomo estas Icha. Ŝi fakte iom scias pri Esperanto kaj iam interesiĝis lerni la lingvon sed pro la okupo ŝi ne plu gardis la intereson. Je la 11a horo ni eniris la ĉambron de kunvenejo por tuj komenci la enkondukon al malgranda grupo de 5 partoprenantoj. Verdire la situacion mi ne imagis tamen mi ja kutime spertis ion similan. Do, senĝene mi klopodis bone prezenti la materialojn kaj respondis la demandojn. La tempo pasis tiom rapide por tiu mallonga enkonduko sed mi esperas ke ĝi povas krei intereson kaj motivon al la partoprenantoj. Laste mi invitis ilin por pripensi partopreni la Trilandan kongreson en 2016.



4	3	1	8	7	9	5	2	8
8	5	6	3	1	2	9	7	4
2	7	8	4	5	1	3	8	
6	4	2	7	3	1	2	5	9
7	1	2	5	9	4	8	6	3
3	9	5	2	6	8	4	1	7
9	2	3	1	8	7	6	4	5
1	8	7	4	5	6	3	8	2
5	6	4	9	2	3	7	8	1



Sudoku

Grado: Facila
Tingkatan: Mudah

Laŭ de Ludi ★ Aturan Permainan

- Analizu ĉiun eblon atingi solvon.
Analisalah setiap kemungkinan untuk mendapatkan jawaban.
- Vi ne povas meti la saman numeron dufoje en la saman vicon aŭ en la 3x3 kvadraton.
Anda hanya boleh mengisi satu angka unik di baris, kolom dan kotak 3x3.
- Bonŝancon! :-)
Selamat mencoba! :-)

5	6			2			8	1
1	8		4					2
		3			7	6		5
3							1	
	1	2		9		8	6	
	4							9
2		9	6			1		
8					2		7	4
4	3			7			2	6

34-a Komuna Seminario en Busan, Koreio, 26-28 Dec 2015

✉ cytorenus@yandex.ru

Sang-Hyeon Song @ Koreio

La 34-a Komuna Seminario en Busan, Koreio daŭros de la 26a ĝis 28a de decembro 2015. Ĉu vi volas aliĝi? Do, tie estas la detaloj.

	26 DEC sab	27 DEC dim	28 DEC lun	29 DEC Mar	
Programoj	Matenmango				
9	Registro	Klubaj Agadoj	Oficiala Kunsido	Tradiciaj Ludoj	
10		Duontaga Ekskurso A	Duontaga Ekskurso B	Korea Kuro	
11				Tagmanĝo	
12		Ne-Pintkunveno (La Senkaŝa Parolo inter Junuloj sen Landlimo)	Kultura Spertoj	Ferma Ceremonio	Unu taga Ekskurso (nur por volontoj)
13					
14					
15		Vepermanĝo	La Nokto de Busan	Oficiala Ĝis~	
16					
17					
18					
19	Malferma Ceremonio	La Nokto de Busan	Oficiala Ĝis~	Privata Ĝis~	
20	Interkona Vespero				
21					
22					



La oficiala emblemo de la 34-a Komuna Seminario. Desegnita de Yuna Choi.

Mapo (Per Busoj)



Ekde flughaveno. 1 horo, 7 haltejoj, 7,000 KRW

1. Ĉe Gimhae Flughaveno Internacia Linio uzu Buson "Airport Limousine 2 (Suyeong) N. 7101";
2. Elbusiĝu ĉe bushaltejo "Novotel";
3. Per piedoj 5 Minutoj.

Ekde stacidomo Busan. 40 minutoj, 13 haltejoj, 1,700 KRW

1. Ĉe bushaltejo "Busan Station" (antaŭ la placo), enbusiĝu en buso "1001" (Ruĝa kaj blanka);
2. Elbusiĝu ĉe bushaltejo "Haeundae Station (Metro)";
3. Per piedoj 9 Minutoj.

Kotizo

Kategorio	Post 15 SEP Antaŭ 15 NOV	Post 16 NOV Kaj Surloke	
Japanio kaj Koreio	80,000 KRW	90,000 KRW	
Aliaj Aziaj Landoj	60,000 KRW	70,000 KRW	
Infano (naskita post 26 DEC 1996)	45,000 KRW	50,000 KRW	
Du Tagoj (por Japanio kaj Koreio)	60,000 KRW	60,000 KRW	Kun dormkosto
Du Tagoj (por aliaj aziaj landoj)	50,000 KRW	50,000 KRW	Kun dormkosto
Unu Tago	30,000 KRW	30,000 KRW	Sen dormkosto
Morala Aliĝo	30,000 KRW	30,000 KRW	Donaco al LKK

La kotizo inkludas nur ĉiujn programojn inter malferma ceremonio kaj ferma ceremonio, 2 noktoj (26-27 Dec) da dormo, 6 manĝojn (ekde vespermanĝo de 26 Dec ĝis tagmanĝo de 28 Dec) kaj duontagan ekskurson. Ĝi ne inkludas unutagan ekskurson, bankedon kaj ĉiujn programojn post ferma ceremonio.

Sendu monon al:

Kookmin Bank # 556201-04-013979

BIC kode: CZNBKRSE

Nomo de la branĉoficejo: Incheon International Airport

Adreso: 1601, Gangbyeon Hanshin Core BLDG, 18, Mapo-daero 4da-gil, Mapo-gu, Seoul, Korea

Telefona numero: [+82-2-717-6974](tel:+82-2-717-6974)

Vagado Tra la Valo de la Rivero Loire

Heather Heldzinger @ Melburno

Ekde la 20a de julio, proksimume 40 esperantistoj iĝis malliberejo ĝis 1963. ekskursis tra la valo Loire en Francujo. Tiu regiono enhavas pli ol cent kastelojn kaj estis nia celo viziti la plej interesajn el ili. Ni loĝis ĉiun nokton en la Kultura Domo de Esperanto en Grésillon, malnova iom kaduka kastelo. Tamen, la litoj estis komfortaj kaj la manĝaĵoj kaj vino ege bonaj; tial, ni ne havis plendojn!

La unuan tagon ni vizitis la gotikan katedralon Notre Dame de Chartres kiu verŝajne estas la plej bona kaj bela ekzemplo de la franca gotika stilo. Ĝiaj vitraloj de la 12a kaj 13a jarcentoj donas al vizitantoj sentojn de spirita intenseco. Pilgrimantoj nun vizitas la katedralon por sperti meson en la latina lingvo.

La duan tagon ni vojaĝis per aŭtobuso al la kastelo Angers, hejmo de la dukoj de Anjou. Konstruita en 1375 ĝi estas mezepoka kastelo kun blanka kaj nigra ĉirkaŭmuro kun 17 turoj. La antaŭa ringofosaĵo nun estas bela ĝardeno kiu elvokas tiun brilan epokon de la kortego, fine de la mezepoko. En 1490 la Reĝo Renato de Anjou plibeligis la ĝardenon per ekzotikaj plantoj. Li ankaŭ estis amatoro pri ekzotikaj bestoj kiujn li prizorgis en la ĉirkaŭremparo. Leonoj, leopardoj, dromedaroj, cervoj, kaj sovaĝaj anseroj formis menaĝerion kun propraj loĝejoj kaj gardistoj. Interne oni malkovras la tapetaron pri la Apokalipso, mendita de la Reĝo Ludoviko 1a en 1375 kaj longa 100 metrojn. Ĝi ankoraŭ restas en tre bona stato.

La Reĝa Abatejo, Fontevraud, kun 900 jaroj da historio estis nia sekvanta haltejo. Ĝi unue havis grandegan bienon por monaĥoj kaj monaĥinoj sub la aŭtoritato de virino (la abatino) ekde la 12a jarcento. Dum la regno de Ludoviko 14a, nobelaj junulinoj ricevis tie kristanan edukon. La Reĝo de Anglujo, Henriko II, kaj sia edzino, Eleanor de Aquitaine, kaj la filo "Rikardo Koro de Leono" estis entombigitaj tie je la fino de la 12a jarcento. Post la franca revolucio la abatejo fermiĝis kaj

iĝis malliberejo ĝis 1963.

En la urbeto Langeais ni vizitis la kastelon kie Karlo 8a kaj Ana de Bretonujo geedziĝis en 1491. Vizito al la kastelo estas tre interesa ĉar ĝi ankoraŭ enhavas meblojn kaj murtapiŝojn el la 15a kaj 16a jarcentoj. La internaj kaj eksteraj partoj de la kasteloj estis konstruitaj per ŝtono kaj ligno kaj daŭre restas en bona stato.

Ni havis bonan ŝancon ĉar nia gvidantino multe studis la historion de la regiono kaj entuziasme komunikis tion al la ekskursantoj. Nia sekvanta vizito estis al la kastelo Blois kiun konstruigis Francisko 1a en la 13a jarcento. Li ankaŭ konstruigis la najbaran grandiozan kastelon Chambord. La Reĝo Ludoviko 12a naskiĝis en la kastelo Blois. Li geedziĝis kun la dukino Ana de Bretonujo kiam Karlo 8a mortis.

La kastelo Blois estis la hejmo de multaj francaj reĝoj, kaj ankaŭ estas la loko kiun Joana de Arko vizitis por ricevi benon de la Ĉefepiskopo de Reims antaŭ sia foriro kun armeo por forpuŝi la angulojn el Orleono.

La kastelo Chambord konstruita dum 1519-1536 estas la plej granda kastelo en la valo Loire. La stilo estas kombinaĵo de gotika kaj renesanca kun multaj italaj ornamaĵoj, precipe sur la tegmento. La kastelo estis konstruita kiel ĉasloĝejo por la Reĝo Francis 1a sed li restis tie, entute, ne pli ol sep semajnojn. La kastelo estis konstruita kun la celo de mallongaj restadoj ĉar la stilo ne estis praktika por loĝi tie pro la tre grandaj ĉambroj kaj altaj plafonoj. Ne ekzistis vilaĝo proksima al la kastelo; tial, manĝaĵoj escepte de ĉasviando ne estis facile haveblaj. Dum vizitoj de ĝis 2000 gastoj ĉiuj aĵoj inkluzive de mebloj, murtapiŝoj, argilaĵoj ktp devis esti enportitaj.

Dum tiuj kvar tagoj ni vizitis multajn belajn kaj interesajn vidindaĵojn. Dank'al la organizantoj de la ekskurso ni havis plezurajn spertojn kaj lernis multon pri la historio kaj kulturo de la regiono.



La 7-a Vintra Kursaro de Suda Aŭstralio

Katja Steele @ Adelajdo

Dum la 6-a kaj la 7-a de junio 2015 Esperanto en Sud-Aŭstralio okazigis vintran kursaron jam la 7-an fojon. Ĉi-foje ni foriris el Adelajdo kaj organizis la eventon en la marborda turisma urbeto Victor Harbor. Tiu ĉi aranĝo estis iom pli kosta ol resti en la kutimaj cirkonstancoj (kaj ĝi donis pli da laboro al la organiza teamo) sed ni ne bedaŭris la decidon. Krom ke ni lernis, tiamaniere ni havis ankaŭ ferian senton kaj certe memorindas la ridoplena vespera ludado kiun ni ne povus havi se ni kunestus nur dumtage. Per movo ekster Adelajdon ni ankaŭ esperis montri nin al la publiko de Victor Harbor kaj altiri novajn interesiĝantojn. Paul Desailly donis informojn pri la kursaro al loka ĵurnalo sed oni ne aperigis ilin. Evidente niaflanke necesas pli da reklama-varba laboro kaj ne sufiĉas nura dismeto de flugfolioj pri Esperanto kaj niaj aranĝoj en diversajn adelajdajn bibliotekojn, kion ni ja faris. La plano estas kursumi ree ie kromadelajde.

Kiel antaŭe, ankaŭ nun ni elektis por la kursaro la tradician tempon: la longan semajnfino de la reĝina naskiĝdatreveno. Laŭ la rimarkoj de la iamaj partoprenintoj ĉi-foje ni havis nur du-tagan kursaron por ke tiuj kiuj devos reiri al siaj laborpostenoj havu unu liberan tagon. Ankaŭ la programo havis la kutiman strukturon: lernado antaŭtagmeze, prelegoj-diversaĵoj posttagmeze. Ni havis 3 komencantojn (instruis Sandor Horvath), 3 progresintojn (gvidis Katja Steele), kaj 8 spertulojn pri kiuj zorgis Trevor Steele. La prelegaro iĝis bunta kun eroj pri la nomoj de la aŭstraliaj bestoj kaj plantoj, Esperantlingvaj tabuaj vortoj, verkaro de Lordo Tennyson, supersekundo, la unua aŭstralia romano, originala fantazia

rakonto de Bob Felby, Ido, skeĉo de novuloj.

La avantaĝo de ĉi-specaj aranĝoj estas ke oni parolas Esperanton ne nur dum la lecionoj sed plej ofte ankaŭ dum la posta kunestado: dum la manĝoj (Indrani regalis nin per supo), dum la vespera kunludado-kunrid(-eg)-ado kaj kunkantado, promenado, aĉetado de libroj aŭ surprovado de novaj t-ĉemizoj (ni havis malgrandan libroservon kaj la t-ĉemizo vendiĝis furore).

Kelkaj statistikaĵoj aldone: entute ni estis 18; la spertaj movadanoj el tio estis 8, la aliaj falis en kategorion “novuloj” aŭ relative novuloj. La plej juna partoprenanto estis Eddie Desailly (11-jara), la plej aĝa Bob Felby (83). Estis ne tre ofta sperto ke ni havis 4 membrojn de unu familio: la geedzojn Birgitta kaj Michael Carney, ilian filinon Madelene (12), kaj la patrinon de Birgitta: Marja Nielsen el Whyalla. Inter la partoprenantoj estis unu lokulo: Darryl Braund, kiu helpis al ni trovi konvenan ejon.

Jen kelkaj komentoj de la kursgvidantoj:

Sandor: Nur tri entuziasmaj komencantoj. Mi refoje miris kiom oni povas lerni dum du matenoj.

Trevor: Mi tre kontentis pri la granda progreso de novuloj.

Katja: Estis agrable labori en malgranda grupo; ĉiu ricevis atenton kaj havis okazon paroli. Jen unu memorinda respondo: unue ni ekzercis la sufikson –et, ekz dometo. Kiam mi demandis kiel esprimi, se io estas granda, Eddie respondis: mal-dometo. Gratulon!



ESPERANTO EN INDONEZIO estas neregula bulteno por la indoneziaj esperantistoj kaj iliaj amikoj. Ĝin redaktas teamo de volontuloj kaj ĝi aperas danke al la kontribuoj de indoneziaj kaj alilandaj kunlaborantoj kaj al la donacemo de malavaraj subtenantoj. Nek la redaktantoj nek la kunlaborantoj ricevas ajnan rekompencan pro sia laboro. Al ĝi povas kontribui kiu ajn, se la kontribuado konformas kun la celoj de la bulteno.

Por havi kiel eble plej kvalitan bultenon kaj por faciligi la laboron de la redaktantoj, ni petas niajn kunlaborantojn atente legi la sekvajn sugestojn/petojn kaj sekvi ilin.

- Akcepteblas tekstoj nur en Esperanto kaj la Indonezia lingvo.
- Prefere verku nelongajn tekstojn en unu el la lingvoj menciitaj ĉi-supre kaj aldonu al ĝi resumon, maksimume centvortan, en la alia lingvo.
- Antaŭ ol sendi la tekstojn, nepre kontroligu ilin pere de aliaj (pli spertaj) kolegoj. Tio povas okazi kadre de Esperanta kunveno aŭ leciono, aŭ rete. La tekstoj estu kiel eble plej seneraraj kaj en bona stilo.
- Bonvolu sendi la tekstojn en redakteblaj formatoj. Ne sendu .PDF-dokumentojn!
- Sendu ankaŭ altkvalitajn bildojn, kaj nepre ne en la teksta dokumento. La bildoj devas veni kun jenaj informoj por ĉiu: klarigo de la bildo (titolo) kaj fotinto. Se vi ne estas la fotinto, ne sendu foton sen la skriba permeso de ĝia aŭtoro. Atentu: ne sendu tro da bildoj en unu mesaĝo - iuj povus malaperi survoje.
- Bonvolu sendi la kontribuadojn kiel eble plej frue. Ne atendu ĝis la lasta momento.
- Estu preta reagi rapide al la petoj de la redaktoroj kaj respektu la limdatojn.
- Ĉiujn materialojn oni sendu al la jena retadreso: iea@esperanto.or.id.

Se vi bezonas pliajn informojn aŭ klarigojn, bonvolu kontakti nin per la ĉi-supra retadreso.

La limdato por kontribuoj al la 10a eldono estas la 20a de Majo, 2016. Dankon.

ESPERANTO EN INDONEZIO adalah buletin bebas untuk esperantis Indonesia dan kawan-kawan. Adalah para relawan yang mengerjakannya, buletin ini dapat terbit berkat kontributor dalam dan luar negeri serta para donatur yang dermawan. Tim redaksi mau pun kontributor tidak menerima kompensasi apapun atas kerja mereka. Siapa pun dapat berkontribusi, asalkan selaras dengan tujuan buletin ini.

Agar buletin dapat dibuat dengan kualitas terbaik serta memudahkan pekerjaan redaktur, mohon para kontributor membaca saran/petunjuk dengan teliti dan mematuinya.

- Redaksi menerima tulisan berbahasa Esperanto dan Indonesia.
- Ada baiknya menulis tulisan singkat dalam salah satu bahasa yang disebutkan di atas, dan berikan ringkasan (maksimum 100 kata) dalam bahasa satunya lagi.
- Sebelum mengirim tulisan, sebaiknya periksa tulisan bersama orang yang lebih berpengalaman. Lakukanlah di pertemuan Esperanto atau secara online. Hindari kesalahan tulisan dan buatlah dalam gaya yang baik.
- Mohon kirimkan tulisan dalam format yang dapat disunting. Jangan kirimkan tulisan dalam format .PDF!
- Kirimkan juga gambar berkualitas tinggi, yang terpisah dari dokumen teks. Sertakan penjelasan gambar dan pembuat foto. Jika Anda bukan pembuat foto, jangan kirimkan foto tanpa izin tertulis dari pemiliknya. Perhatian: jangan mengirim banyak gambar dalam sekali pengiriman. Foto bisa saja hilang saat pengiriman.
- Silakan kirim kontribusi Anda sesegera mungkin. Jangan menunggu hingga tenggat waktu.
- Bersiaplah untuk bereaksi dengan cepat merespon permintaan redaksi dan mematuhi batas waktu.
- Kirimkan seluruh materi ke alamat berikut: iea@esperanto.or.id.

Jika Anda memerlukan lebih banyak informasi dan penjelasan, silakan hubungi kami melalui alamat e-mail di atas.

Batas akhir penyerahan naskah untuk edisi 10 adalah 20 Mei 2016. Terima kasih.



Esperanto en Indonezio

★ Duonjara oficiala bulteno de la Indonezia Esperanto-Asocio (IEA). Naskiĝis en 2013. Sendita al IEA membroj senpage.

🇮🇩 *Buletin per semester resmi dari Asosiasi Esperanto Indonesia (AEI). Terbit semenjak tahun 2013. Didistribusikan kepada anggota AEI secara cuma-cuma.*

Ĉefa Redaktoro
Penyunting Utama
Arman Yusuf

Plenuma Redaktoro
Penyunting Pelaksana
Ilia Sumilfia Dewi

Alamat Redaksi
Redaktoro-Adreso
Wisma Sarinah Lt. 1 (Gripwell)
Jl. Majapahit No. 8
Jakarta 10160 Indonesia
✉ iea@esperanto.or.id
☎ [+628-111-77-33-87](tel:+628-111-77-33-87)

Provleganto
Penyunting Bahasa
Trevor Steele
(Aŭstralio)

